# *Komenci?as la dialogo inter Kubo kaj Usono.*




La kuba ministerio pri eksteraj rilatoj informis ke la dialogo inter Kubo kaj Usono je la plej alta nivelo de la lastaj jardekoj malfermas la vojon al restarigo de la diplomatiaj rilatoj kaj pritrakti aliajn temojn de reciproka intereso.

La komuniko sciigas ke Kubo sidas ?e la dialogo kun konstrua spirito pri respekta konversacio surbaze de la suverena egaleco kaj reciprokeco, sen mistrakto de la nacia sendependeco kaj de la memdetermino.

Oni sciigas ke ne ?io povas esti solvata en unu sola kunsido, sed ke amba? landoj anta?eniras por restarigi la rilatojn, sed temas pri procezo longa kaj kompleksa kie oni devas trakti plurajn temojn.

La? sciigis la oficiala informfonto de la koncerna ministerio, la usona prezidento Barack Obama adoptis decidojn en pozitiva direkto, sed oni devas multe avanci en temoj kiel la sie?o ekonomia, financa kaj komerca unuflanke altrudata al la insulo.

Dum du tagoj amba? delegitaroj pritraktos la migran temon, la ekon de la procezo por restarigi la diplomatiajn rilatojn kaj aliajn temojn rilatajn al kunlaboro, interalie.

La usonan  delegitaron prezidas la asista sekretario ?tata por la aferoj de la okcidenta hemisfero, Roberta Jacobson, la plej altranga funkciulo kiu vizitas Kubon ekde la fino de la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento.

Flanke de Kubo, la delegitaro estos prezidita de la ?enerala direktoro pri Usono de la ministerio pri eksteraj rilatoj, Josefina Vidal Fereeiro.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/44184-komencigas-la-dialogo-inter-kubo-kaj-usono

**Radio Habana Cuba**